Christian Morgenstern,

La luno

tradukita de Richard Schulz

Ne estas luna ŝanĝ' kaprico,
Ĝi ŝanĝas nome pro ofico.

Kaj dilatante kaj cedante
prezenti sin laŭ-Esperante.

Formante D-on kaj C-on formante,
kaj tiel ĉiun tuj helpante.

Farante tion, la trabanto
deklaras sin por Esperanto.

Traduko de la Germana poemo "Der Trabant" de Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* Richard Schulz *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26).*

Arg-924-1856 (2014-09-06 08:53:44)

La origina germana teksto de la poemo legeblas en `http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Galgenlieder_061.jpg`*. Tie estas videblaj la per malnova germana manskribo skribitaj literoj "a" kaj "z".*